



KONSULTIĜA ASEMBLEO

ĉe la Kongreso de la Popoloj

*Milito, terorismo,
homaj rajtoj
mizero de la plimulto
malŝparado
poluado ...
problemas
mondnivele,
superas la
kompetentecon de la
naciŝtatoj,
postulas mondajn...
demokratajn solvojn*

La estonteco de la mondo koncernas ĉiun.

Milionoj da izolitaj homoj, miloj da asocioj provas aŭdigi sian voĉon, krias la angoron de la mondo, ellaboras proponojn, kiujn ili penas efektiviĝi. Sed iliaj provoj restas nesufiĉaj, malfortaj kaj ofte nedaŭraj.

Al tiuj kritikaj kaj proponaj fortoj mankas la forto de la leĝo. Mankas monda leĝo, demokratie bazita, kapabla agadi por la antaŭgardo de la planedo, por la pluvivo de la homaro, por la defendo de ĉies rajtoj.

La Kongreso de la Popoloj, institucio naskita de la volo de pli ol 100.000 voĉdonantoj el 120 lando, nun proponas al individuoj kaj organizaĵoj, kiuj tion deziras, dialogan kaj proponan spacon : la **Konsultiĝa Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj.**

SIN RENKONTI

KUNE LABORI

ELLABORI PROPONOJN

AGADI

**KAJ PROGRESI AL MONDA
DEMOKRATIO**

Kiuj rajtas partopreni en la Konsultiĝa Asembleo ?

- Ø La organizaĵoj naskitaj de la mondcivitaneco : Registrocentroj, studaj komisionoj, fakaj asocioj, organizaĵoj, kiuj partoprenis en la balotelektado al la Kongreso de la Popoloj, kaj tiuj aprobitaj de ĉi lasta ;
- Ø La « mondcivitanaj teritorioj » aŭ iliaj ĝemelkomitatoj ;
- Ø La organizaĵoj, kiuj subskribis la « *Mulhuzan* » aŭ alian tutmondiĝan ĉarton ;
- Ø La registritaj mondcivitanoj kaj la individuoj akceptitaj por partopreni en forumoj aranĝataj sur Interreto

Sur kiu bazo ?

- Ø Komuna Ĉarto kaj Reglamento konsistigas la referencajn tekstojn por transversa kaj transnacia kunlaborado.
- Ø Simbola kaj alĝustebla kotizo de 20 €jare.
(pagado je la ordono de « Mondcivitanoj / ASKOP »)

Kiel ?

Forumoj, kolokvoj, seminarioj, retaj laboroj, renkontiĝoj ... laŭ la iniciatoj kaj la specifecoj de la invitantaj organizaĵoj.

Kio estas Kongreso de la Popoloj ?

Ĝi estas elektitaro reprezentanta la mondan loĝantaron, almenaŭ la parteton el ĝi, kiu enregistriĝis en la mondajn voĉdonantajn listojn de post 1949. Tiuj balotelektoj koncernis pli ol 100.000 voĉdonantojn el 120 landoj. La Kongreso de la Popoloj konsistas el 45 Delegitoj kun naŭjara mandato. La Kongreso de la Popoloj estas renovigebla trione ĉiun trian jaron. La estonta balotelekto okazos en 2010.

Kiuj estas la misio kaj rolo de Kongreso de la Popoloj ?

La Kongreso de la Popoloj havas kiel ĉefan mision la malfermadon de vojo al tutmonda demokratio. Ĝia fina celo estas la okazigo de Monda Konstitucianta Asembleo. Sed ne atendante tian rezultaton, la Kongreso de la Popoloj publike deklaras pri la aktualecaj aferoj, kiuj endanĝerigas la estontecon de la homa komunumo kaj de la planedo ; ĝi povas starigi aŭ aprobi instituciojn por pripensa aŭ agada laboro pri la grandaj tutmondaj problemoj. Ĝi povas ankaŭ entrepreni aliajn taskojn kun tutmonda intereso.

Kongreso de la Popoloj kreis :

- Ø Instituton pri Tutmondismaj Studoj (1977)
- Ø Gazetagejton « AMIP » (1980)
- Ø Mondan Solidarecon kontraŭ la Malsato (1982) - MSM
- Ø Konsultiĝan Asembleon ĉe la Kongreso de la Popoloj (ASKOP) (2004).
- Ø Juran Registro-Servon (2006)

www.recim.org/kdp

La celo de ASKOP : Arigi la organizaĵojn kaj ĉiujn, kiujn opinias ebla alian mondon en multajn asembleojn, por ke ĉiuj renkontiĝu, interŝanĝu siajn spertojn kaj siajn dezirojn kaj ke ili submetu ilin al la reprezentaj organoj, por ke je la nivelo, kie situas la problemoj, la elektitoj difinu la juron : la homaj rajtoj, la homaraj rajtoj, la rajtoj de la venontaj generacioj, kaj sendube ankaŭ la devoj, kiuj rezultas el tiuj rajtoj.

Kelkaj utilaj adresoj :

Ø Konsultiĝa Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj

Esperanto :	Sekretariato
Daniel Durand	Alain Bal
Les Nids	16 rue de Belleneuve
49190 ST AUBIN DE LUIGNE	21120 BINGES (Francio)
abc@recim.org	al.bal@laposte.net

Ø Kongreso de la Popoloj

Liliane Metz-Krencker
6 rue St-Fridolin
FR 67200 STRASBOURG, Francio
lilianemk@aol.com

Ø Registrolibro de la Mondcivitanoj

66 boulevard Vincent Auriol,
FR 75013 PARIS, Francio
Tel : 0145 8603 58 - abc@recim.org

Konsultiĝa Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj

Ĉarto de Mulhuzo

Ni, membroj de la Konsultiĝa Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj, opinias ke la agnosko pri la digno rilata al ĉiuj membroj de la homa familio kaj pri iliaj rajtoj egalaj kaj neforigeblaj konsistigas la fundamenton de libero, justo kaj paco en la mondo.

Ni konstatas

- Ø oftan opozicion inter la naciŝtataj interesoj kaj la interesoj de la monda popolo, same kiel la mankon de ĉia transnacia aŭtoritato demokratie elektita por gardi ĝiajn interesojn ;
- Ø ke malsato, mizero kaj milito ne estas fatalaĵo, sed la sekvoj de la politika organizo de la planedo ;
- Ø la neceson konstrui sociojn demokratiajn. justajn, partoprenajn, daŭrajn kaj pacajn ;
- Ø ke la mondaj problemoj postulas globajn solvojn kiuj respektas la diversecon de la homa familio ;
- Ø ke la homoj endanĝerigas la riĉaĵojn de nia planedo per intensiva ekspluato de la grundo, de la subgrundo kaj de la maroj ;
- Ø ke la individuoj kaj la grupoj agas plej ofte en maniero egoisma, ne zorgante pro la aliaj, precipe kiam ili estas foraj.

Ni volas

- Ø partopreni en la kreo de demokratia monda parlamento. el kiu unu la modeloj estas la Kongreso de la Popoloj ;
- Ø promocii la pacon, la rifuzon pri diskriminacioj, la egalecon antaŭ la leĝo kaj la spiriton de solidareco ;
- Ø krei spacon por reflektoj kaj interŝanĝoj malfermitan al ĉiuj, kaj kontribui al la konstruado de solidareca mondo, kunigante la iniciatojn de tie kaj aliloke ;
- Ø riĉiĝi per niaj diversecoj por trovi niajn similecojn, kupli niajn reflektojn al eksperimentado kaj agado konkreta sur la tereno ;
- Ø gardi la riĉaĵojn kaj la biodiversecon de nia planedo por la nuna kaj estontaj generacioj ;
- Ø ke ĉiu individuo kaj grupo estu responsaj pri la bonfarto de la aliaj kaj la harmonia evoluo de la planedo.

Ni alvokas ĉiun organismon kaj ĉiun individuon kies idealoj estas mondcivitismaj kaj demokratiaj aliĝi al la Konsultiĝa Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj por kunkonstrui alian mondon, pli bonan, unuiĝintan. plurkulturan kaj pacan, subskrihante ĉi tiun Ĉarton.

En Mulhuzo, la 3^{an} de oktobro 2004.

Inter la membraj organizaĵoj de ASKOP :

Aŭstralio ; Asocio de Civitanoj de la Mondo - AWC-AU ; **Benino** : Afrika Centro Mondcivitana ; Benina Centro por Evoluigo de Bazaj Iniciatoj BCEBI - CBDIBA ; Esplor-Centro pri Iniciatoj por la Disvolvigo Agrikultura kaj Metia ECIDAM - CERIDAA ; Fondaĵo Lovesse por Edukado kaj Paco - FOLEP ; Brazilo ; Planeda Unio ; Bulgario : Legejo "Interkulturo 21 jarcento" ; **Burkinio** ; Asocio Junularo Solidara - AJS ; Centro de Helpo, Klerigado, Dungado kaj Staĝo - CHKDS - CAFES - ; **Ĉadio** ; Unuiĝo de la Privataj Radioj de Ĉadio ; **Eburio** ; Volontuloj de la Sano ; PLAYDOO-CI ; **Francio** ; Domo de la Mondcivitanejo MCM-ARSO ; Asocio por la Antaŭenpuŝo de la Solidareco - ASPROS ; Franca Registrocentro de la Mondcivitanoj ; Esperanto - Libereco ; Internacia Urĝa Agado - AUI ; La Granda Anstataŭiĝo ; Movado "Citerrien" ; Planedo - Koloroj ; Agadi por Homaj Rajtoj ; **Ganao** ; Monda Font-Agentejo ; **Hindio** : Asocio por Mondaj Konstitucio kaj Parlamento - (WCPA - Azio) ; Kongolando : Planeda Komunuma Vilaĝo Mont-Sagesse ; Planeda Komunuma Vilaĝo M'Fa ; Kongio ; Amikoj de Desmond Tutu - ADT ; Asocio por la Ina kaj Familia Plenhomiĝo (AEFFA-ONG, Malalta-Kongo) ; Ekvatora Okulo ; Monda Solidareco - Kune Agadi - SMAE ; Ligo por la Defendo kaj la Vulgarigo de la Homaj Rajtoj - LDVDH ; Solidareco kaj Agado ; Tutmondista Klubo por Humanismo kaj Evoluigo - CMHD ; Tutmondista Komunumo de Kalonge ; Volontula Asocio por Kampano Memevoluiĝo AVOLAR ; **Maroko** ; Asocio de la Evoluigaj Laborejoj en Maroko - ACDM ; **Senegalio** ; Senegala Mondcivitana Registrocentro - CDM-SN ; Federacio de la Sereraj Asocioj ; **Svisio** ; Germanlingva Mondcivitana Asocio ; La Universala Ponto ; **Togolando** ; Asocio de preĝo kaj de monda paco - SPPM ; CILAME-Togolando ; Kristiana Asocio por Ĉies Progreso ACDT ; La Universala Ponto ; Klubo de Kulturoj kaj Liberaj Tempoj ; Togolanda Forumo de Lukto Kontraŭ la Mizero FOTOLCOPA ; Togolanda Konsilio por Evoluigo CTD ; Usono ; Tutmonda Popola Asembleo ; **Transnacio** ; Monda Movado por Tutmonda Demokratio - WMGD ; Komunumo de la civitanoj de la mondo - CWC ; Konsilio de la mondcivitanaj Teritorioj ; Kune Agadi - Civitanoj de la Mondo ; Internacia Komitato por Tutmonda Aŭtoritato pri Medio - IKTAM - CILAME ; Esperanta Civito ; Registrolibro de la Mondcivitanoj - RCM ; Monda Solidareco kontraŭ la Malsato - MSM. ; Instituto de Tutmondismaj Studoj - IEM ;

Asocioj aŭ individuoj, se vi interesiĝas je partopreno en **Konsultiĝa Asembleo ĉe la Kongreso de la Popoloj** (ASKOP) aŭ je portempa kunlaborado, vi povas :
Ø sendi al ni remesagon al <
Ø aŭ sendi al ni tiun ĉi kuponon per poŝto al la adreso : ASKOP, ĉe Alain BAL, 16 rue de Belleneuve, FR 21270 BINGES.

ALIĜO AL KONSULTIĜA ASEMBLEO ĈE LA KONGRESO DE LA POPOLOJ

NOMO DE LA ORGANIZAĴO :

Aŭ :

NOMOPersona nomo :

ADRESO

POŝTA KODO _____ **URBO** _____ **LANDO** _____

TEL : _____ @ : _____ **http://** _____

Subskribas la Mulhuzan Ĉarton

Petas sian aliĝon al ASKOP

£ (organizaĵoj) **sin devontigas pagi la jaran kotizon de 20 €**

kaj invitos siajn membrojn partopreni en la forumoj de ASKOP

En la

Subskribo (kaj asocia stampo)

Celoj de la asocio / agada kampo / aparta intereso / proponoj :

.....
.....
.....
.....